

Memorigo pri Katina Dacini

Dum la tagoj 18-a kaj 19-a de februaro grupoj de samideanoj kunvenintaj en Maso kaj en Pizo, sin rigardantaj per senaŭdeblaj voĉoj, per intensa penso kaj spirita kunestado, salutis la finon de la tera vivo de Katina Dacini (Catina Dazzini). Ili alportis intime salutojn de samideanoj el diversaj regionoj de la nordo kaj de la sudo de Italio.

Ankoraŭfoje regis impresoj de la sentoj pri "esti aŭ ne esti", sed la agado de Katina restas en la memoro, kiel subtenilo de decidoj kaj kondutoj en la esperantista kampo, precipe en la instruada.



Katina Dacini komencis interesiĝi pri E-o tre juna, kiam ŝi sekvis asertojn kaj ekzemplojn de la frato Marjo. Ŝi fariĝis lia aktiva kunlaborantino, precipe en organizado de E-instruistoj, ĉu naciaj ĉu internaciaj, ankaŭ se tro ofte ŝi fidis pri kunagado de bonvolemluloj.

Plurfoje ŝi estis elektita kiel ĉefdelegitino de UEA en Italio. Konata kiel instruistino pri beletro en mezgradaj kaj superaj lernejoj, ankaŭ en konversacioj ŝi instruis la lingvon internacian kaj ne forlasis okazojn por klarigoj kaj, laŭnecese, korektoj. Ofte ŝia ĉeesto per kantoj revekis dum ekskursoj la ĝojon de la kunestado.

Malsano en la kruoj dum la lastaj jaroj bremsis ŝiajn agadojn; tamen per helpo de porinvalidaj ĉaretoj ŝi daŭre ĉeestis preskaŭ ĉiujn manifestaciojn en Italio kaj eksterlande, alportante gratulojn kaj sugestojn. Dum la lastaj vintraj monatoj ŝi ŝajne fartis pli bone kaj kontente moviĝis preskaŭ libere, sed atako de vejna embolo subite interrompis funkciadon de la koro kaj de la pulmoj.

Ŝi ĉiam sugestis agadojn kaj iniciatojn por atingi atenton de la lernejoj aŭtoritatuloj, kaj per la persona sindonemo ŝi atingis rezultojn.

Espereblas ke ŝia ekzemplo estos daŭra stimulado por plifortigi iniciatojn kaj metodojn. Pri ŝia agado menciindaj estas la rilatoj kun la organizaĵoj en Sanmarina Respubliko por la Akademio de Sciencoj, ŝia konstanta, preciza kaj tre grava laboro pri la Biblioteko de Esperanto en Kastelo Malaspina, je kiu sekvis starigo de la E-sekcio ĉe la ŝtata Arkivo en Maso, la granda laboro por traduki la verkon de germana filozofo prof. Vogelmann.

Krome ŝi ĉiam partoprenis la komisionon por studi kaj subteni la enkondukon de E-o en la lernejojn, ekde kiam, en la jaro 1964, la koncerna leĝpropono komenciĝis esti konsiderata de pluraj italaj parlamentanoj.

Ni ĉiuj ŝuldas al Katina Dacini - kiel al la frato Marjo kaj al aktivaj kunlaborantoj - la paŝojn per kiuj E-o progresis. Nia devo estas daŭrigi tiun progreson, ankaŭ inter malfacilaĵoj devenantaj de novaj administraj reguloj kaj de novaj personoj kun ŝanĝiĝantaj pensmanieroj, ĉar la celo de E-o estas ĉiam aktuala, kiel kultura helpo al kunigado de la homoj.

Umberto Stoppoloni, prezidinto de Itala Esperanto-Federacio

La artikolo aperis en IPR, 1997-2.